

Kunlaboro inter UEA kaj SAT, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, 6-a parto
Teknika nomenklature

Claude Gacond, 367-a radioprelego, 1970.10.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Estas interese vidi kiel Gaston Waringhien priskribis sian rolon koncerne al la teknika parto de la *Plena Ilustrita Vortaro*, kiun SAT ĵus eldonis. Ni legas al vi erojn el ĉapitro de la **Antaŭparolo** titolita **La teknika parto**.

A.- « Same kiel Grosjean-Maupin en la *Plena Vortaro*, skribas Gaston Waringhien, mi persone okupiĝis pri la fakoj de la humanaj sciencoj : filologio, beleto, estetiko, historio, mitologio. [...]

Cl.- Pri la ceteraj fakoj kaj sciencoj mi kompreneble respektis la tekston de la difinoj liveritaj de la respektivaj kompetentuloj : tial oni povas konstati iajn diverĝojn, ekzemple pri la tradukado de la litero **h**, demando, kiun povas solvi nur la uzado.

A.- En kelkaj okazoj tamen mi devis interveni, aŭ por certigi la homogenecon de la nomenklature, aŭ por rifuzi monstre aspektan neologismon, al kiu mi proponis pli humanan anstataŭaĵon, aŭ korekti lingvan malklaraĵon aŭ nekorektaĵon, aŭ por glatigi la stilon : sed ni ĉiam facile atingis kontentigan kompromison.

Cl.- La teknika lingvo ankoraŭ ne tute fiksiĝis, kaj oni povas esperi, ke la analogio harmoniigos kun la tempo kelkajn disonancojn : same kiel **ŝoforo** venkis la iaman **ŝofero**, eble iun tagon **komputero** cedos la lokon al la pli Esperanta **komputoro**.

A.- Sed estas iuj kampoj, ĉe kiuj la internacia uzo mem dividiĝas.

Cl.- Ne estis nia rolo trudi al ĝi arbitran unuecon : ekzemple mi enmetis, apud la angla-germana nomado de la muziknotoj per literoj, la sistemon de la franca, itala, bulgara kaj rusa, kiu nomas ilin per la komencaj silaboj de vortoj el latina himno ; same pri la brit-usona mezurunuoj apud la metraj, kaj tiel plu.

A.- La diverseco estas iafaje eĉ pli granda, kaj ĉiu nacio havas siajn apartaĵojn, tiel ke Esperanta termino povas doni nur la ĝeneralan ideon de la afero : ĝia difino devas do resti kompromise malstrikta ; ekzemple la formoj kaj funkcioj de la instruada profesio, de la ŝtata asekurado kaj aliaj tro diverĝas, por ke oni povu priskribi ilin per unuecaj terminoj ; same okazas pri la naciaj pladoj, vestoj, ludoj kaj tiel plu.

Cl.- En tiaj okazoj restas la privilegio de ĉiu aŭtoro aŭ tradukisto jen konservi la nacian terminon, jen uzi Esperantan transskribon, kaj aldoni al sia teksto detalan, precizan difinon.

A.- Sed tiuj malfacilaĵoj ekzistas ja por ĉiuj samspecaj verkoj, kaj ne estas specialaĵoj de la nia.

Cl.- Ili do ne devas kaŝi la fakton, ke dank'al la kunlaborado de grupo fervora da esperantistaj fakuloj aŭ sciencistoj el multaj landoj la nuna *Plena Ilustrita Vortaro* kapablas rivali kun la plej konataj samdimensiaj vortaroj en la naciaj lingvoj kaj pri la moderneco de la nomenklature kaj pri la ekzakteco de la difinoj.

A.- Tial ĝi prezentas utilon nekontesteblan, ne nur por la anoj de malgrandaj nacioj, kiuj ankoraŭ ne disponas en sia lingvo enciklopedian vortaron, sed eĉ por la anoj de la grandaj, kiuj disponas ja tian, sed ne ĉiam trovas en ĝi vere internacian prezentadon de la materialo.

Cl.- Oni jam laŭdis la rolon de Esperanto kiel pontlingvo ; nia arda deziro estas, ke ankaŭ la *Plena Ilustrita Vortaro* ludu analogan rolon sur la leksikologia tereno. » (Fino de la citaĵo.)

A.- D-ro André Albault respondecis pri la medicina parto de la *Plena Ilustrita Vortaro*. En enkonduko li priskribas la kompleksecon de la medicina fakvortaro. Jen kelkaj liaj diroj :

Kunlaboro inter UEA kaj SAT, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, 6-a parto
Teknika nomenklature

Claude Gacond, 367-a radioprelego, 1970.10.21 & 24

Cl.- « Bazo de tiu kontribuo estis la bonega *Esperanta Teknika Medicina Vortaro*, kiun D-ro Briquet aperigis en 1932, cetere jam en konsultado kun Gaston Waringhien.

A.- Sen ĝi nenio estus farebla.

Cl.- Sed intertempe medicino tre progresis kaj samtempe populariĝis ; nocioj ne konataj de la tiutempaj fakuloj nun tiel disvastiĝis, ke iliaj nomoj ofte venas sur la lipojn eĉ de nekleraj personoj : penicilino, antibiotikoj, kolesterolo, alergio kaj tiel plu, kaj tiel plu.

A.- Aliflanke ankaŭ Esperanto kreskadis kaj iom seniĝis je diversaj lingvaj tabuoj, ofte naskitaj de ia sento de malsupereco.

Cl.- Tial, forigante la tro fakajn nociojn kaj aldonante la pli modernajn, ni devis selekti la plej taŭgajn vortformojn el la diversaj, kiuj plekte-mikse prezentiĝas en la Vortaro de Briket.

A.- Ekzemple al la formo **elektrokorografio** aliaj aŭtoroj jam preferis **elektrokardiografio**, formon kutiman en la tri ĉeflingvoj de medicino, angla, franca kaj germana ; kiel tuto, tiu lasta formo povus akiri civitraĵon en Esperanto dank'al la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko ; sed estas pli ekonomie kaj racie fari plian paŝon kaj noti la radikon **kardi** kiel « grekan radikon » : ne uzebla sola, ĝi servas por formi multajn kunmetaĵojn, prefere kun aliaj grekaj radikoj, sed ne ekskluzive kun tiaj.

Cl.- Evidente tio kondukas al la rezulto, ke ni havas en medicino du, iafoje tri radikojn por unu sama nocio. [...]

A.- La fakuloj retrovos do, post la komunlingva difino de ĉiu anatomia vorto, la terminojn de la *Internacia Anatomia Nomenklature* en kursivaj literoj. » (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Ĉiu en sia fako trovas apud la komunaj formoj terminojn pli precizajn : André Albault citas la ekzemplon **dento-doloro**, kiu por kuracisto fariĝas **ondotalgio**.

A.- Tiu unua provo kunvivi la komunan vortaron kun la plej teknikaj terminoj havos verŝajne multajn mankojn. Ekzemple ni ne povis trovi, kie sin kaŝas la grekaj radikoj **odont** kaj **algi**, nek kie oni povus trovi la signifon de **odontalgio**.

Cl.- Tiujn mankojn notos la fakuloj. La proponitajn formojn ili eksperimentos, kaj tiel iom post iom la ĵargono de la scienculoj preciziĝos kaj fariĝos universala. Tiu universaleco ne nur dependos de la esperantistoj, sed ankaŭ de la normigo de la terminoj, kiun iniciatos diversaj mond-organizaĵoj.

A.- Vi konstatas, ke la verkado de vortaro ne estas infan-ludo, ĉefe kiam oni deziras recenzi la fakajn vortojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-